

LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

JOSO, LA MALGRANDA CIGANO.

Apud la vilaĝo, sed for de la domaro, loĝis Joŝo, la malgranda cigano, kun sia patrino en malgranda, malpura, pentrinda kabanaĉo. Patron li ne konis. Despli li amis Manjon, la dolĉan patrineton. Ŝi estis ankoraŭ juna kaj bela. Dum la somero ili vagadis de vilaĝo al vilaĝo kaj nur en la malfrua aŭtuno ili revenis.

Joŝo devis viziti la lernejon. Sed li ne volis. La instruisto vizitis la ciganaron, afable parolis al la infanoj kaj donacis al ili sukeraĵojn. Ĉiuj kuraĝiĝis kaj vizitis de tiu tempo la ciganolernejon, kie oni instruas al ili muzikon kaj diversajn manlaborojn. Ĉar la ŝtato deziras civilizi la ciganojn.

Sed Joŝo ne venis en la lernejon. Li forkuris en la arbaron, kaŝis sin ie, aŭ, se oni tamen trovis lin, li ŝajnigis sin malsana. Lia plej granda malamiko estis la „longkrurulo”. Tiel Joŝo nomis la instruiston. La instruisto vere ne malamis Joŝon, li eĉ tre amis lin kaj pro tio li deziris ankaŭ Joŝon feliĉigi per civilizado. Sed Joŝo estis cigano nefalsita. Li ne toleris la aeron en ĉambroj, escepte la fumplengitan en sia kabano. Li ne iris en la lernejon kaj la ŝtataj oficistoj ne sciis, kion fari. Ili provis perforton. Sensukcese! Joŝo forkuris ĉiam. Kaj ĉar li opiniis, ke nur la „longkrurulo”, la sinjoro instruisto, deziras tiel turmenti lin, li pli kaj pli furioze malamis la bonan pedagogon kaj tute evitis renkonti lin.

Joŝo sentis sin libera, fiera cigano. Kaj samtiel sentis ankaŭ Manjo, la kara patrineto. Se la ĝendarmoj ŝin insultis pro Joŝo, ŝi nenion diris. Sed se ili estis for, ŝiaj nigraj okuloj ekbrilis kaj ŝi ĉirkaŭbrakis sian belan filon. Si per sia bruna maneto karesis la

nigran hararon de Joŝo kaj diris: „Karulo mia, mi tre, tre amas vin. Vi similas vian patron”. Kaj poste ŝi rigardis malproksimen kaj fariĝis malgaja. Ofte ŝi preskaŭ ekploris. Tiuokaze Joŝo, la brava, fiera sentaŭgulo metis siajn brakojn ĉirkaŭ la bruna kolo de la bela patrino. Li kisis ŝin foje kaj refoje. Kaj la nigraj hararoj de patrino kaj filo brilis, kvazaŭ ili reĵetis la brilon, kiu vidiĝis en la larmoperloj, kurantaj trans la brunaj, belaj vizaĝoj.

Manjo amis sian filon, kiel ĉiu ciganopatrino amas siajn infanojn. Sed Joŝo adoris, amegis la patrinon. La patrino estis por li ĉio. Li volonte donus la vivon por la patrino. Li eĉ faris plion: La kara amata patrino malsaniĝis. La bela ciganino kuŝis en sia kabano sur fojno kaj apud ŝi kaŭris la sentaŭgulo kaj kun granda timo li observis la palan vizaĝon de la malsanulino. Ŝi ĝemadis kaj ĉiu ĝemo trapikis al Joŝo la batantan koron. Li pripensis: „Antaŭ du monatoj malsanis Jurgo, la maljuna cigano. Lia edzino petegis la kuraciston de la vilaĝo. Ĉi tiu estas bonkora kaj ĉiam donacas al la ciganoj. Li ankaŭ venis rigardi la malsanulon kaj donacis „sorĉopulvoron” al la maljunulo. Jurgo vere resaniĝis.”

Ankaŭ Joŝo kuris al la doktoro sorĉisto. La bona sinjoro venis kaj trovis Manjon tre malsana. Li donacis pulvoron al Manjo kaj la febro malpliĝis. Poste li diris: „Knabo, via patrineto estas tre malsana. Havigu lakton al ŝi. Ĉiutage vi recevos ĝin en la lernejo.” Poste foriris la kuracisto.

Joŝo luktis kun la ploro. „En la lernejo!” Estis ĝuste: La ciganinfanoj ĉiutage tie ricevis lakton. Joŝo ĝis nun rezignis je tiu matenmanĝo, kvankam li ofte terure malsatis. Sed nun la patrino malsanis kaj ĝemis pro doloro. Joŝo ne dormis dum la nokto.

Kaj matene, jen okazis la nekredebla. La instruisto miris treege, kiam je la oka alvenis Joŝo en la lernejo. Tuj li ricevis lakton kaj tuj sen dankvorto li forkuris al la patrino.

Sed kiom granda estis la miro de la bona instruisto, kiam ree alvenis Joŝo post duona horo en la lernoĉambro. La sentaŭgulo ekvidis sur seĝon kaj deklaris, ke li de nun ankaŭ deziras lerni kiel la aliaj. Kaj kun ĝojego la „longkrurulo” de tiu tago instruadis la obstinan ciganon kaj Joŝo nun ne plu montriĝis obstina, sed li tre fervore penis kapabliĝi pri ĉio. Ĉiutage la sentaŭgulo ricevis la lakton — por la patrino. Oni donis al li pli ol al la aliaj. Kaj Joŝo pli fervore lernis ol la aliaj. Li montriĝis la plej inteligenta.

La patrineto en la kabano plifortiĝis kaj saniĝis kaj kun ĝojkrio Joŝo ĉiam salutis sian panjon, kiam li venis de la lernejo

Dume printempigiĝis. Multaj ciganoj formigris. Joŝo vizitadis la lernejon. Li nun amis la instruiston — Sed ĉiutage sopire atendis la patrino kaj vespere ŝiaj rigardoj forflugis malproksimen kaj ŝia Joŝo sidis apud ŝi kaj liaj pensoj akompanis ŝin for — for en la belan mondon.

Estis belega majotago. Ĉi tiun matenon la instruisto ne plu vidis Joŝon en la lernoĉambro. La bonkora pedagogo tuj vizitis la kabanon, sed li trovis neniun. La vaguloj estis for. Kaj ili neniam plu revenis.

Ĉu la sentaŭgulo hontis pro sia maldankemo? Ĉu li ne plu povis toleri la ĉambro-aeron? Oni neniam plu vidis lin kaj la patrineton. Certe estas, ke li ankoraŭ nun tutkore amas la karan patrinon kaj, ke li por ŝi denove vizitus la lernejon. Li ja estas Joŝo, la obstina sentaŭgulo, Joŝo la fiera ciganobubo, Joŝo, la bravega filo.

Aŭstrio. (Orig. laŭ simila okazaĵo) J. WIESBÖCK.

LA BLINDA KNABO.

(J. J. L. Ten Kate)

Panjo, restu apud mi,
Diru, kiel floras flor',
Diru, kiel la kampar'
Hele brilas en l'aŭror!!

Bela estas la floret',
Oni diras, kaj la land',
La rozet' kun sia kron'
Kaj la bird' kun sia kant'!

Ĉie vagas mi, ho ve!
Tra malluma land' sen lim'.
Panjo, restu apud mi:
Sola min ekkaptas tim'!

Panjo, ŝatus vidi mi
Ĉion ĉirkaŭanta min:
Sed unue ŝatus mi
Unufoje vidi vin!

Bele sonas via voĉ'
Kiel kant' de najtingal'.
Ĉu pli bela povas do
Esti sunobril' en val'?

Kiam kantas vi, patrin',
Laŭ anĝela melodi':
Paradizon, en sunbril'
Sin bananta, vidas mi.

Panjo, ŝatus vidi mi
Ĉion ĉirkaŭanta min:
Sed unue ŝatus mi
Unufoje vidi vin!

Antwerpen, Belgujo.

Tradukis Jan van Schoor.

LA BOTISTO IMPETULO.

Estis iam botisto, kiu nomiĝis Impetulo. Kiam li eliris en la urbon, komence li iris malrapide, kaj poste pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, kaj fine kiam li impetis, li kuregis tiel rapide, ke li antaŭkuris veturilojn kaj eĉ tramveturilojn. Kompreneble oni ne povas tiel kuregi en la urbo, tial sinjoro Impetulo havis ofte diversajn malagrablajn okazaĵojn. Unuj pensis, ke li kaptas ŝteliston, aliaj, ke li mem estas ŝtelisto. Ili komencis kuri post li, kaj la kurado finiĝis per tio, ke s-ro Impetulo ekfaletis pro io, renversiĝis sur la teron kaj aliaj kurantoj falis sur lin. Kelkfoje tiamaniere oni preskaŭ sufokis la botiston Impetulon.

Pli malbone estis hejme. Kiam s-ro Impetulo komencis labori kaj najli kalkanumon, komence li batadis per martelo malrapide, kaj poste pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, kaj fine kiam li impetis, li batadis tiel forte, ke li frakasis la tutan kalkanumon. La botoj fariĝis maluzeblaj kaj s-ro Impetulo anstataŭ ricevi monon por sia laboro, devis aĉeti ankoraŭ novajn botojn por siaj klientoj. Oni povas facile kompreni, ke lia metio donadis al li malgrandan profiton.

Tiel same parolis s-ro Impetulo. Komence malrapide tiel, ke ĉiun vorton oni povis bone kompreni, kaj poste pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, kaj fine oni povis nenion aŭdi, nur trrrrr kvazaŭ turbo turnis sin sur la planko.

Ce la sama strato loĝis en bela domo vidvino de la bankisto Monamulo. Sinjorino Monamolino estis tre riĉa, sed terure avara. Foje ŝi sendis al s-ro Impetulo sian servistinon kun ŝuoj, por ke li ilin plandumu. Sinjoro Impetulo faris grandajn okulojn pro mirego. Neniam en la vivo li vidis tiajn ŝuojn! Fliko sidis sur fliko kaj ankoraŭ ĉiu fliko estis kvaroble flikita.

Bonvolu ripari ilin antaŭ morgaŭ, — diris la servistino — ĉar alie mia sinjorino ne povus eliri el la domo.

Sinjoro Impetulo komencis labori. Sed kiam li nur ekbatis kaj kudris per peĉfadeno, li tiom impetis, ke post mallonga tempo el unu ŝuo restis nenio. Sinjoro Impetulo ĉagreniĝis terure. Sed kion fari? Li prenis la duan ŝuon por mezuro, aĉetis ĉe alia botisto tutan paron da novaj ŝuoj de la sama grandeco kaj la sekvantan tagon matene, preninte la ŝuojn sub la brakon, li iris al s-ino Monamolino. Ĉar la sinjorino loĝis tre proksime al li, li ne havis tempon por impeti.

Li supreniris la ŝtuparon, kovritan per bela ruĝa tapiŝo, en la duan etaĝon kaj sonorigis ĉe la pordo. Sur unu flanko de la pordo pendis leterkesto, sur la alia estis en la pordo ronda malfermaĵo, ŝirmita per malgranda kupra klapeto, kion oni ofte havas por vidi, kiu ekstere sonorigas.

Al s-ro Impetulo oni longe ne malfermis kaj pro enuo li komencis tamburi sur la pordo per siaj fingroj. Li ne sciis, ke oni ne enlasis lin pro tio, ĉar la servistino eliris en la urbon, kaj s-ino Monamulino neniam iris mem malfermi la pordon. Sed ĉi tiun fojon aŭdinte, ke iu frapetas per fingroj la pordon, ŝi, ekinteresita pro tio, alproksimiĝis al la pordo, por vidi, kion signifas ĉi tio. Ŝi deŝovis la kupran klapeton kaj alproksimigis sian okulon al la malfermaĵo.

Sed s-ro Impetulo intertempe jam impetis kaj frap! — li ekbatis ŝian okulon per tuta forto. Sinjorino Monamulino ekkriis terure kaj renversiĝis teren. Nur per ĉi tiu krio s-ro Impetulo ekkonsciis pri tio, kion li faris. Li ektimegis kaj forkuris. Kaj li impetis tiom, ke li haltis nur malproksime ekster la urbo. Kaj antaŭ ol li sukcesis reveni hejmen, jam vesperiĝis. La sekvantan tagon matene vizitis lin la servistino de s-ino Monamulino.

Mian sinjorinon volis hieraŭ ataki rabistoj — ŝi komencis rakonti. — Feliĉe, ke la pordo estas tre fortika, ĉar alie ili certe estus murdintaj kaj elrabintaj ŝin.

Sinjoro Impetulo kompreneble ŝajnis, kvazaŭ li nenion sciis pri tio, kaj scivole demandis ŝin detale, kiamaniere ĉi tio okazis. La servistino diris al li, ke kvar rabistoj venis al la domo kaj unu el ili volis al s-ino Monamulino elpiki la okulon per ponardo. Tuj tiaj babilegaĵoj elkreskis el la afero. Sinjoro Impetulo ŝajnis, ke li ĉion kredas.

Nu, nu, — li diris — kiel danĝere estas nun en la mondo — kaj kvazaŭ mirante li komencis balanci la kapon. Komence malrapide, poste pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, pli kaj pli rapide, ĝis per la balancado lia kolo fariĝis tiel longa, ke li jen per la kapo frapis sian ventron, jen reĵetis la kapon sur sian dorson. Al la servistino, kiu unuafoje vidis tian strangaĵon, ĉi tio terure plaĉis. Ŝi pensis, ke s-ro Impetulo scias montri ĵonglaĵojn. Sed ĉio ĉi estis ankoraŭ nenio kompare al ŝia mirego, kiu ŝin kaptis, kiam s-ro Impetulo redonis al ŝi la botojn de s-ino Monamulino.

Ili estas ja tute novaj! — ŝi ekkriis — kaj mi alportis al vi malnovajn kaj eluzitajn.

Ĉar mi scias tiel rebonigi, — ekmensogis s-ro Impetulo — ke eĉ la plej disŝiritaj botoj fariĝas ĉe mi tute novaj.

La servistino mutiĝis pro mirego. Ŝi malfermis la buŝon tiel larĝe, kiel por la kuracisto, kiam li volas explore rigardi en la gorgon, kaj poste ŝi ekprenis la botojn tiel delikatege, kvazaŭ ili estis el vitro.

Sinjoro Impetulo terure ridegis kaj ĝojegis, ke li tiel sukcesis trompi ŝin. Sed ne longe daŭris lia ĝojo, ĉar en la sama tago post tagmeze s-ino Monamolino sendis al li tridek parojn da malnovaj ŝuoj por riparo. Ŝi kunkolektis ĉiujn plej malnovajn ŝuojn, kiujn ŝi nur havis hejme: truhavajn, senkalkanumajn, senplandajn. Ŝi havis multege da ili, ĉar ŝi estis tre avara kaj neniam donacis malnovajn ŝuojn al iu ajn almozulo, sed kaŝis ĉion en la kameron. La servistino devis kunpreni grandan korbon por povi ĉion alporti. Kiam s-ro Impetulo ekvidis tiom da ŝuoj, lia vizaĝo tuj plilongiĝis kaj tiamaniere, ke li ekbatis per la mentono sur la tablon.

Mi ne volas ripari ĉi tiujn ŝuojn! — li ekkriis, kaj ĉar li estis kolerema, tial li tuj impetis.

Tiom da ŝu.....oj, tro multe da ŝu, ŝu.....oj! — li komencis ripetadi rapide, pli kaj pli rapide, tiel, ke post momento jam nenio estis aŭdebla, nur: ŝu, ŝu, ŝuŝuŝu..... — kvazaŭ kuregis lokomotivo. La servistino ektimis kaj forkuris.

Polujo. El la pola lingvo tradukis: Prof. SYGNARSKI.

RICEVITAJ LIBROJ.

Ni atentigas eldonantojn de libroj, ke „**La Juna Vivo**” estas gazeto por la junularo kaj sekve recenzas nur tiujn librojn, kiuj estas interesaj por la junularo. Aliaj verkoj ni nur mencias.

Pasko, de August Strindberg. Dramo en tri aktoj. El la sveda lingvo tradukis Stella Engholm. 88 paĝ. Prezo: 0,62 gld.


Esperantaj Historietoj I, Eldonis Peter Frey, Clausensvej 26, Haderslev, Danujo. Formato: 13,5 × 19,5 cm, 48 paĝa. Prezo: broŝ. 0,35 guld. La libro konsistas el kolekto de historietoj, kaj estas tre taŭga por komencantoj.

Zwagers' Esperanto Zakwoordenboek, door A. Blok. 0,90 guld.

Ĉi tiuj libroj estas mendebblaj ankaŭ ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”.

Unu akvoguto efikas malmulte, sed multaj gutoj formas poten-
can maron.

NOVA MONUMENTO POR ZAMENHOF.



Je ĉielirtago okazis sur la Holanda insulo Tekselo la inaŭguro de monumento honore de Zamenhof. Pli ol 400 esperantistoj ĉeestis la ceremonion. Reprezentanto de la ministro de klerigado paroladis. La monumento konsistas el kolono, ses metrojn alta, portanta terglobon. La verda stelo servas kiel ventmontrilo. Busto de doktoro Zamenhof ornamas la antaŭflankon de la kolono.

La tuto estas impona kaj belega konstruaĵo. Ĝi atestas pri vigla esperanta vivo sur la insulo.

**Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.**

LA CIKADO KAJ LA FORMIKO.

Cikado kantis dum la tuta somero, sed, kiam la vintro venis, ĝi havis nenion por manĝi. Ĝi do petis de la najbarino, laborema formiko, kelkajn grenerojn por vivi ĝis la printempo. La formiko, kiu ne estis donema, demandis la cikadon:

„Kion do vi faris dum la somero?”

„Tage kaj nokte mi kantis!”


„Vi kantis! Mi tre ĝojas pro tio. Nu, dancu nun!”

Kaj la cikado malgaje foriris kaj mortis pro malsato.

Hautmont, Francujo.

KARLETO.

KUKOLO KAJ AZENO.



KU - KO - LO KAJ A - ZE - NO DIS - PU - TIS PRI Ĝ DE -



MAND' EL I - LI' KI - U RA - VAS KAJ ĈAR MAS PLI - PER



KANTO

„Mi certe!” la kukolo
Komencis kun defi’;
„Mi vin superas multe!”
Kontraŭis azenkri’.

Proksime, fore ĝemis
La homoj „Ho!” kaj „Ha!”
Ĉar ambaŭ ĉarme kantis:
„Kukuk! Kukuk! I—a!”

Lösnitz, Saksujo

trad. M. STRÜMPFEL.

ANEKDOTOJ.

Fraŭlino: „Fi, fi, knabo, ĉu vi ne hontas? Kial vi prenas tiujn birdidojn el iliaj nestoj? Imagu la malĝojon de la patrino, kiu ne plu trovas siajn idojn?”

„Ne gravas,” respondas la knabo, „la patrino nenion scias pri ĉi tio, ĉar ĝi sidas sur via ĉapelo.

Plumbisto tenis preta ardan lutilon.

„Se mi ricevas dekcendan moneron, mi lekos ĝin!” diris knabo, kiu rigardis momenton.

„Tion mi deziras vidi!” respondis la plumbisto, kaj li donis la moneron al la knabo.


Ĉi tiu ridetante lekis la arĝentan moneron kaj forkuris kun ĝi.

Amsterdamo, Nederlando.

C. VAN TUSSENBROEK.

Varbu abonantojn.

NOVA ENIGMO.



a, e, e, e, g, i, j, j, l, l, o, o, o, o,
o, o, o, p, p, r, r, r, t, u.

La vortoj signifas:


horizontale: 1. beston, 2. parton de la kapo. (plur.) vertikale: 3. kajerujon, 4. sciencon.

Riga, Latvujo.

BRUNO REICHBERG.

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 4 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Aŭgusto.

SOLVOJ EL NO. 18-19.



Nur unu (f.ino Ouwerkerk—Slidrecht—Nederlando) el la multaj sendintoj ĝuste solvis la enigmojn.

Vortŝanĝado. (skribludo)

Oni prenu mallongan vorton, ekz. „tero”, kaj ŝanĝu ĉi tiun vorton en ekz. „mano”. Oni rajtas ŝanĝi nur unu literon ĉiufoje, kaj post ĉiu ŝanĝo devas resti taŭga vorto.

Ekzemple: tero — teno — beno — bano — mano.

Tiu, kiu ŝanĝas la vorton laŭ la plej mallonga maniero gajnas la ludon. Plej taŭgaj estas 3—7 literaj vortoj.

West-Graaftdijk.

N. K.

LA BLINDULO KAJ LA LAMULO.

En azia urbo vivis du malfeliĉuloj: Unu estis lama kaj la alia — blinda, kaj ambaŭ malriĉaj.

Ili petadis la ĉielon fini ilian vivon, sed la petoj estis vanaj; ili ne povis morti.

La lamulo, kuŝanta sur litaĉo en la urba placo, suferis sen ia ajn kompatato, kaj pro tio suferis des pli multe. La blindulo estis sen gvidanto, sen apoganto, ne havante eĉ mizeran hundon por lin ami kaj gvidi.

Iun tagon okazis ke la blindulo, palpe ĉe stratkurbiĝo, subite aŭdis la ĝemkriojn de la lamulo, kaj li estis kortuŝita: Nur la malfeliĉuloj povas kompati unu la alian.

„Mi havas miajn suferojn, kaj vi — la viajn, ni kunigu ilin, frato mia, kaj ili estos malpli teruraj.”

„Ve,” diris la lamulo, „vi ne scias, frato mia, ke mi eĉ unu paŝon ne povas fari! Vi mem ne vidas, al kio utilis kunigi niajn suferojn?”

„Al kio?” respondis la blindulo. „Aŭskultu! Ni ambaŭ disponas pri la havo, al ĉiu necesa: Mi havas krurojn kaj vi — okulojn, mi portos vin kaj vi estos mia gvidanto. Viaj okuloj gvidos miajn paŝojn. Miaj kruroj portos nin, kien ni deziras. Estos neeble diri, kiu el ni faras la pli grandan servon: Mi iros por vi, kaj vi vidos por mi!”

Nanterre, Francujo.

MATHYN.

ATENTU!

KORESPONDADRESO: ĉiu vorto: 0,03 gld.

Al niaj infanoj: Ĉiu infano, aŭ infangrupo, kiu abonas „La Juna Vivo”, havas la rajton enpresigi senpagan korespondadreson unufoje en la jaro.

Nederlando: Infangrupo el Middelie deziras korespondi kun infanoj el ĉi. Certe resp. Adreso: F.ino A. Bijl, Instruistino, Middelie.

Jugoslavio: Nia malgranda amiko en Jugoslavio, kies fotobildo staris en la antaŭa numero de „La Juna Vivo”, petis al ni enpresigi jenajn vortojn:

„Multajn salutojn kaj koran dankon al ĉiuj miaj korespondantoj-geamikoj!

Prvoslav M. FILIPOVIC.”

Li aldonis, ke li ricevis multajn il. poŝtkartojn, kaj eĉ kelkajn libretojn, sed pro manko de mono ne estas al li eble respondi kaj danki ĉiun persone.

LA DUDEK UNUA LECIONO.

A. Kiu nun skribas leteron estas skribanto. Kiu nun promenas estas promenanto. Kiu nun kantas estas kantanto.

B. Muzikanto, naĝanto, **kolektanto**, **prezidanto**, vizitanto, **migranto**, vojaĝanto, laboranto, ludanto, serĉanto, preter-iranto, ĉirkaŭ-starantoj, **vaganto**, parolanto, lernanto, leganto, **posedanto**.

muzikanto — muzikisto, vojaĝanto — vojaĝisto, laboranto — laboristo, skribanto — skribisto.

C.

TRI RAJDANTOJ.

Viro rajdis hejmen sur **azeno**, dum lia filo pied-kuris apud li.

Venis migranto kaj diris al la patro: „Ne plaĉas al mi, ke vi rajdas kaj via filo devas kuri. Vi ja estas pli forta ol via filo!”

La patro **grimpis** de la azeno kaj **permesis** la filon rajdi.

Ree venis migranto. Ĉi tiu **ek-parolis** al la filo: „Fi bubo! Via maljuna patro devas pied-iri! Viaj kruroj ankoraŭ estas junaj kaj fortaj!” Jen ankaŭ la patro surgrimpis la azenon kaj la du kune rajdis malgrandan distancon, ĝis ili ree renkontis promenanton, kiu kriis: „Terure! Du fortaj, sanaj homoj rajdas sur malforta azeneto. Vi meritas punon!”

Kaj nun la du degrimpis kaj piediris apud la azeno. Venis kvara vojaĝanto kaj ridis: „Vi stultuloj, ĉu ne unu el vi povas rajdi?”

„Nu,” diris la patro, unu el ni ankoraŭ ne rajdis. Estas la azeno.”

Do la patro per ŝnurego kunligis la antaŭajn piedojn de la azeno kaj la filo la malantaŭajn, kaj ili metis la azenon teren. Poste ili ŝovis arbotrunkon inter la piedojn de la besto kaj tiel hejmenportis ĝin sur la ŝultroj.

Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

D. ek-dormi, ekvidi, eksidi, **ekbruli**, ekkrio, ekkrii, ekkriegi, ek-kanti, eklabori, ekridi, ekridegi, ekrideti, ekplori.

E. re-veni a la domo = denove veni al la domo.

re-legi = denove legi, re-vidi = denove vidi.

redoni, reiri, rediri, reaŭdi, resalti, **reĵeti**, retrovi, reformi, rekoni, rekomenci.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D, E.

II. Traduku A, B, C, D, E en vian gepatran lingvon.

III. Legu kelkfoje la historion pri „Tri rajdantoj” kaj rakontu la enhavon en via grupo.

LA DUDEK DUA LECIONO.

Kiom da plezuro!

„Ĉu ni rajtas ludi sur la placo, patrino?”

„Ho, patrino, ĉu ni rajtas?” petis Petro kaj Manjo.

Estis en la **kristnask**-libertempo. Sur stratoj kaj placoj ankoraŭ kuŝis neĝo.

„Mi ege timas, ke okazos **akcidento**. La glitado estas tre danĝera.”

„Tute ne, panjo, ĝi ne estas danĝera! Kiel povas okazi akcidento al ni per glitado!” kriis Petro.

„Vi facile povas fali!”

„Tio ne **doloras**, kaj ni ne falos!”

La patrino iris kun la infanoj al la antaŭĉambro. Tie ili povis vidi la placon. Kelkaj infanoj glitis en longaj **vicoj**.

Kiam Petro kaj Manjo vidis la ludon, ili tre deziris kunludi.

„Aĥ patrino, ankaŭ ni iru!”

„Sed promesu al mi, ke vi ne glitos ĉe la grandaj knaboj”.

„Bone, patrino!”

Petro kaj Manjo forrapidis kaj baldaŭ ili pretigis glitejon.

„Faru tiel!” kriis Petro. „Tiel, unu piedo apud la alia, kaj staru **rekte**.”

Manjo provis, sed ŝi glitis nur mallongan distancon.

„Estas pro miaj altaj kalkanumoj!” ŝi diris.

Nun Petro ree alrapidis. Sss..... s! Li glitis ĝis la fino. Manjo ankoraŭfoje **klopodis**, sed ŝi ne **sukcesis** tiel bone, kiel Petro.

„Ĉu vi volas **tiri** min?” ŝi petis.

Petro konsentis. Manjo **kaŭris**, kaj tenis la **surtuton** de Petro.

La patrino estis en la antaŭĉambro kaj rigardis al ili. „Estas **afable** de li,” ŝi pensis.

Jen Petro faris salteton. Li klinis sian kapon, kvazaŭ li estis ĉevalo.

„Ho ve,” pensis la patrino, „nun ili eble falos.”


Plof, Petro el-glitis, kaj ambaŭ kuŝis en la neĝo. La patrino ek-timis.

Kia estos la fino? La infanoj rapide ekstaris. Ili ridegis.

Nun la patrino ankaŭ ridis al la infanoj.

Kiom da plezuro!

- a. Lerne bone la novajn vortojn.
- b. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
- c. Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al jenaj demandoj:



Kio kuŝis sur la strato? Kial la infanoj ne tuj rajtis gliti? Kion timis la patrino? Kien iris la patrino kun la infanoj? Kion ili vidis? Kion faris la infanoj sur la placo? Kion la infanoj devis pro-

El: „Ligthart en Scheepstra, Dicht bij Huis”, J. B. Wolters, Groningen—Den Haag—Batavia.

mesi al la patrino? Kion ili pretigis? Ĉu Petro bone povis gliti? Ĉu Manjo povis gliti tiel bone kiel Petro? Kial ne? Kion petis Manjo? Kion ŝi nun faris? Ĉu la patrino vidis la infanojn? Kie ŝi estis? Kio okazis? Ĉu la infanoj ploris? Kion faris la patrino?

ATENTU:

La lernejestroj en Wissekerke kaj Callantsoog (Nederlando) komencis instrui siajn lernantojn per „La Juna Vivo”. (entute oni nun instruas 16 infangrupojn per nia gazeto).

La jenaj novaj grupoj abonis la revuon:

Nederlando: en Wassenaar, Rijswijk, Deventer, Twello.

Ĉeĥoslovakujo: en Brünn, Slezko-Teš.

Danujo: en Hillerød.

Svedujo: en Stockholm.

En „Oosterkwartier” (Harlema gazeto) aperis „Militema Filo” el No. 11 de „La Juna Vivo”.

F.Omelka (Hluk) tradukis kaj publikigis en ĉeĥa porinfana gazeto „Mládi” „Danĝera ludilo” el No. 16-17.

En la bulgara junulargazeto „Veseladružina” la redaktoro empresigis: „Ivan kaj Miŝo” el No. 16-17.

Sekvu tiun bonan ekzemplon. Por la esp. movado ĝi estas multvalora! Neniam forgesu mencii sub la tradukita verkaĵo: „El „La Juna Vivo”, internacia gazeto por la junularo kaj komencantoj. Redakcio: West-Graaftdijk (N. H.), Nederlando.”

Mallonga jarraporto pri „La Juna Vivo” aperos en la aŭgusta numero.

KORESPONDADO.

J. H. en B. (Svis) — J. v. Sch. en A. (Belgujo). Mi ripetas, kion mi jam antaŭe skribis. Poemoj ĝenerale estas tro malfacile kompreneblaj.

T. en Sybrandaburen (Ned.) Dankon pro via letero. Mi ricevis multajn laŭdajn leterojn, sed ne povas presigi ilin en la gazeto.

S. M. G. en Leiden (Ned.). La rakonto ne estas interesa por ĉiuj legantoj de „La Juna Vivo”.

H. K. en Sliedrecht (Ned.). Tiaj historioj ne estas realaj.

F. O. en H. (Ĉeĥosl.) Oni ne rajtas skribi fabelojn pri nuntempaj personoj.

Bournvilla. Esp. grupo. (Angl.) Ni nemetos en venontan numeron.

H. G. en Varsovis Polando. Malnovaj fabeloj mi ne ŝatas. „Novaj tempoj, novaj temoj!”

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 7 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

LEGU!!!

LA LUMTURO DE ESPERANTO
 (Le Phare de l'Esperanto)

Monata, Sendependa organo.
 Multe da artikoloj estas en franca kaj
 esperanta lingvoj. Jarabono 10 fr. fr.
 Redaktejo, Villa Zamenhof, Sisteron
 (B—A)
FRANCLANDO

Jarkotizo

Aŭstrio	3.20 ŝil.
Britujo	3 ŝil.
Belgujo	17 fr.
Ĉeĥoslovakujo	16½ Ĉ. kr.
Danujo	3 kr.
Germanujo	1.75 M.
Hispanujo	5 pes.
Norvegujo	2.7 kr.
Polujo	3.6 zl.
Svedujo	2.70 kr.


„FLORETOJ”

Porinfanaj Rakontoj
 tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
 en Winschoten
 (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
 bildoj
 de C. Jetses
 prezo 0.70 ned. guld.

**Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
 eldonisto:**

J. B. WOLTERS

**Groningen — Den Haag
 Batavia.**

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Ameriko: Amerika Esperanto-Instituto, Madison. Wis., Usono.

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

Aŭstrio: S.ro Scheibenreiter, Hermangasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Ĉeĥoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen, „U Zvonu” ĝironumero 14171 Praha.

Danujo: S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev. ĝironumero 44593.

Francaujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d'Or.
 ĝironomero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d'Or).

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana
 ĝironumero: „Köln 104097”.

Hispanujo: S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.

Svedujo: John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

Japanujo: Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

Ĉinujo: S-ro Can, 15 Shang Sieh Chia, Peiping.

Bulgarujo: Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, Sofia.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, **7 poŝtrespondkuponoj**, *) ĝiro-
 konto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtofiĉejo, kio estas la plej
 malkara.

*) Abonantoj, kiuj ne rajtas sendi monon eksterlanden, povas pagi per
 7 respondkuponoj.

Abonu tuj la poplarsciencan dumonatan Gazeton

SCIENCA GAZETO

Nun pligrandigita ĝi aperas sur 20 dense presitaj paĝoj kaj kovrilo. Pluan pligrandigon ni projektas. Enhavas multegon da informoj sciencaj en facile legebla lingvo.

Jarabono: Unu dolaro usona (3 sv. fr.)
Specimeno kontraŭ respondkupono

Amerika Esperanto-Instituto

556 State St., Madison, Wis., Usono

La Esperantistoj revis havi gazeton redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj. Ilia revo efektiviĝis!

Aperis:

NIA GAZETO

- o Monata.
- o La plej malkara.
- o Grandformata. Illustrita.
- o Internacia kunlaborantaro.

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Kornfeld.

Abonprezo: fr. fr. 15 = 1,5 guld.
Adreso: 29, Avenue de la Victoire,
Nice, Francujo.

LA BRITA ESPERANTO ASOCIO ELDONAS:

FANNY. Edna Ferber (Berno Fabo)

QUO VADIS VOL. I. H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)

QUO VADIS VOL. II. H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)

ŜI. Sir Rider Haggard (G. J. Degenkamp)

LA VIRO EL FRANCUJO. Ivans (W. V. Graftdijk)

RICA KAJ SEN MONO. E. Philips Oppenheim. (F. E. Wadham)

LA ORA STUPARO. E. Philips Oppenheim. (Romford Esp. Societo)

Binditaj ĉi tiuj libroj kostas 1,25 guld. (1 guld. = 2,1 sv. fr.)

Vidu ankaŭ la liston de libroj en No. 18—19 de „La Juna Vivo.”

ELDONA SOCIETO ESPERANTO, (Svedujo.)

GÖSTA BERLING. Selma Lagerlöf. (Stella Engholm) Prezo: broŝ. 2,28 guld., bind. 2,85 guld.

SVEDA ANTOLOGIO. Sub redaktado de Sam. Jansson. Pli ol 40 kunlaborantoj. Unua parto (volumoj I—II) 432 paĝoj. Prezo: broŝ. 3,25 guld. bind. 3,80 guld.

TRA SOVAĜA KAMĈATKO. Sten Bergman (Birger Gerdman) Prezo: broŝ. 1,70 guld., bind. 2,28 guld.

KONSCIENCO RIPOĈAS. August Strindberg (G. H. Backman) Prezo: broŝ. 0,38 guld.

LA MONO DE SINJORO ARNE. Selma Lagerlöf. (Stella Engholm) Prezo: broŝ. 0,57 guld.

LA INFANOJ DE BETLEHEM. Selma Lagerlöf. (Oscar Frode) Prezo: broŝ. 0,30 guld.

Ĉi tiuj libroj estas mendebaj ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”. Por la afranko bonvolu aldoni 10 %.

Subtenu „La Junularlaboron”, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!